

# **35a ILEI-KONFERENCO**

**28 Julio – 4 aŭgusto 2001-09-16  
Lovran, Rijeka, Kroatio**

**Protokolo de la**

## **KOMITATKUNSIDOJ**

Dimanĉe la 29an de julio 2001 (11-13.15h)

### § 1 ĈEESTANTOJ

Estas aldonita al la protokolo listo enhavanta ĉiujn partoprenantojn.

### § 2 BONVENIGO

Prezidanto Mauro la Torre prezentas la Estraron, kompletigitan posttagmeze, prezentas la tagordon kaj deklaras la konferencon malferma.

#### § 2.1 MESAĜOJ

Mauro la Torre voĉlegas oficialan mesaĝon de UEA-estrarano pri edukado, Gbeglo Koffi, kiu aludas inter alie la reviziadon de la ekzamena sistemo.

Salutas por Aŭstralio: Jennifer Bishop. Kunlaboro kun Unesko-komisiono, informbroŝuro farita, la bazlerneja fremdlingva instruado fiaskas, donas novan ŝancon por Esperanto.

Francio: sukcesa infanrenkontiĝo en Grésillon reokazis. GEE zorgis ke 175 Esperanto-parolantaj infanoj (el 600 partoprenantoj) vizitis Europo-parlamenton (Euroscola). Nova ekspozicia materialo celas informadon al mezgradaj lernejoj.

Italio: konigo de KEC havigis 26 membrojn. Partoprenis en Interkulturo, Komputilaj kursoj por junuloj.

Kroatio: Maria Beloŝević salutas.

Kubo: La plej reprezentata Landa Sekcio. Hector Jiménez legas detalan raporton. Interalie ke la Centra Oficejo ricevas 8-10 informpetojn ĉiutage. Du-partigo de baza kurso liveris pli da respondoj de kursanoj. 12 instruistoj partoprenis tri-tagan seminarion en majo: oni volas internaciigi la eventon.

Rumanio: Instruado okazas en ĉirkaŭ dek lernejoj. Unu direktoro volas fari sian lernejon "Esperanto-lernejo". Du el la lernantinoj en Pedagogia Liceo povis viziti la UK-n en Zagrebo. Alvoko ĝemeliĝi kun rumanaj lernejoj ne havis respondon.

Ruslando: Irina Gonĉarova salutas por Rusa Esperanto-Unuiĝo, ĉar instruista sekcio mankas.

Svedio: Agneta Emanuelsson kaj Boo Mee Kim-Lindblom: Nova longdaŭra instruado en du gimnazioj, Upsalo kaj Lerum, de kie lernantoj partoprenis en Euroscola. Jam de longe tuttempaj tutsemestraj kursoj en Karlskoga Popolaltlernejo kaj kursoj en la gimnazio en Elsinburgo (Helsingborg).

Usono: Ron Glossop transprenis de Charlotte Kohrs "Infanoj ĉirkaŭ la mondo". La plej sukcesa el la hejme instruantaj gepatroj, kiuj ofte elektas Esperanton, estas Bill Maxey (ĉeestanta).

Jugoslavio: Radojica Petrović mencias ke la duontaga ekskurso kostas monatsalajron!

Venezuelo: Johano Bachrich diras ke la kvar instruistoj en la lando ja aktivis sed mankas lernantoj.

Kroatio: Veŝnja Branković diras ke post la milito eksplodis Esperanto-aktiveco: 110 organizantoj plene okupis la podion de salono Zamenhof dum la fino de la UK-malfermo. Estas 50 membroj en la ĵus fondita sekcio de KEL (300 oficialaj membroj).

Estas laŭtleĝinta grandafiŝan ilustritan saluton de Jules-Verstraeben-lernejo en Benino. Karina MacGill desegnos la respondon.

## § 2.2 KONSISTIGO DE KOMITATO

Laŭlanda kontrolo de voĉrajtoj: Aŭstralio, Francio, Hungario (oni akceptas nesubskribitan rajtigon al Stefan MacGill), Italio, Kroatio (Marija Belosević sendis anoncon al Bulgario), Nederlando: 3 voĉoj, Rumanio, Svedio: 3 voĉoj, Usono: 2 voĉoj, Kubo. Ĉeestas entute 15 komitatanoj, do inter malpli ol 40 komitatanoj minimume triono. Ĉeestas kvorumo.

## § 2.3 KVORUMO

Ĉeestas kvorumo, 15 el malpli ol 40 komitatanoj.

## § 2.4 PROTOKOLO de 2000 en Kvinpetalo

Aprobo de la protokolo pri la pasintjara komitata laboro (IPR 2000/3). Listo de la rekomendoj kaj ties plenumo estas revuata.

## § 2.5 ALDONAĴOJ

Elektado de protokolanto: Akceptis Agneta Emanuelsson. Provizore protokolas ankaŭ Rob Moerbeek. Neniu kontraŭas.

Mauro la Torre proponas ke la ero 2.6 "Nomumo de elektokontrolantoj" transiru al 7.1. Akceptite.

Stefan MacGill proponas eron 7.4 "Honoraj membroj". Akceptite.

Sekciaj raportoj estas prokrastataj; same punkto 6. Do, traktataj prefere punktoj 4, 5 kaj 7.

Vespera kunsido 18.15 h.

## §4 FINANCA RAPORTO

La financoj: IPR en 1999 kostis pli, ĝenerale ĝi egalas la membrokotizon. En 2000 sukcesis eta ŝparo. La rezultkonto estas unuanime akceptita (14 por).

## § 4.1 BUĜETO (IPR 2/01)

La buĝeto antaŭvidas 10 % kreskon de la kotizoj. Radojica Petrović informas ke la UEA-komitato asignas 6 000 eŭrojn por edukado. La buĝeto estas unuanime aprobita.

#### § 4.2 RAPORTO DE KONTROLA KOMISIONO

La kontrola komisiono (Bo Sandelin, Bertil Andreasson kaj Lars Forsman, anstataŭanto) trovis la financajn dokumentojn en ordo, proponas malŝarĝon de la kasisto kaj estraro pri 2000. Unuanime danke akceptita.

#### § 4.3 RAPORTO DE EKZAMENA KOMISIONO

Mallonga raporto de la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK). Dum la jaro sukcesis 30 kandidatoj, nur 2 en UK (IPR 2001/2). La raporto estas unuanime danke akceptita. Mauro la Torre opinias ke estrarano havu taskon rilati kun IEK.

#### § 4.4 RAPORTO DE REGULARA KOMISIONO

Mankas aliaj raportoj krom pri eldonado kaj libroservo.

#### § 4.5 RAPORTO DE LERNEJA KOMISIONO

Mankas aliaj raportoj krom pri eldonado kaj libroservo.

#### § 4.6 RAPORTO PRI ELDONAĴOJ

Stefan MacGill: Juna Amiko estas ekspedata 10% malpli koste ol per la poŝto. La enorman laboron transprenos Sandor Hideg.

Raporto pri IPR, Internacia Pedagogia Revuo: La redaktoro laboras bone. La nova estraro zorgu ricevi aktualajn abonlistojn. Raporto pri libroj

Kun multa danko (R Glossop) la raporto estas akceptita.

#### § 5 MALŜARĜO DE ESTRARO

La estraro estas malŝarĝata de sia respondeco kun unu sindetena voĉo.

#### § 7 ELEKTOJ

Estrarelekto: La Elekta Komisiono (Gwenda Sutton, Joseph Catil kaj Maritza Gutierrez) proponas por la tri vakaj lokoj (La nunaj 4 estraranoj restas laŭ decido en 2000): Agneta Emanuelsson (sekretario), Radojica Petrović kaj Sabine Trenner.

Atilio Orellana Rojas ripetas ke nia sistemo de ĉiujara elektado estas tro tempraba. La regulara komisiono (Hans ten Hagen, Rob Moerbeek) proponu ĝis la sekva konferenco en Fortaleza adapton de la regularo, tio estas aboli la rotacian sistemon de elektoj.

#### § 7.2 ESTRARO (NUNA)

Prezidanto Mauro la Torre, vic-prezidanto Stefan MacGill, sekretariino Mariana Evolgieva, help-sekretariino Jennifer Bishop, kasistino BooMee Kim-Lindblom. DU LOKOJ VAKAS!

##### § 7.2.1 KANDIDATOJ

Agneta Emanuelsson, Radojica Petrović kaj Sabine Trenner.

##### § 7.2.2 ELEKTOJ

La tri kandidatoj Agneta Emanuelsson, Radojica Petrović kaj Sabine Trenner, estas kune, inkluzive de sekretarieco de Agneta Emanuelsson, elektitaj, unuanime.

##### § 7.2.3 NOVA ESTRARO

La nova estraro konsistas el sep personoj, nome Mauro la Torre, Stefan MacGill, Jennifer Bishop, BooMee Kim-Lindblom, Agneta Emanuelsson, Radojica Petrović kaj Sabine Trenner.

Marde la 31an de julio

Rondiras listo por adresoj de la komitatanoj kaj alia papero por noti plendojn.

Raportoj de la sekcioj iru al IPR, se ne jam okazis. Simile prelegresumoj. Impresojn konferencajn sendos Rob Moerbeek, kiu ankaŭ okupiĝos pri kongresa rezolucio kun Maritza Gutierrez: Ĝi estu tradukita. Same necesas gazetara komuniko.

### § 3 RAPORTOJ

#### § 3.1 SEKCIOJ

Landaj kaj sekciaj raportoj. Atilio Orellana Rojas mencias la kunlaboron inter hispanlingvaj sekcioj, atingitan en aprila kongreso en Meksikurbo. Krome, ke la nederlanda sekcio, bonhava sed stagna ĵus ekkunlaboris kun la kuba sekcio por havigi al ili instrumaterialojn kaj invitas aliajn sekciojn al similaj ĝemeliĝoj. Mauro la Torre komparas la ĝemeliĝajn adoptojn kadre de Interkulturo. La Sveda Esperanto Federacio (SEF) tiel kunlaboras kun Tanzanio. Stefan MacGill ripetas pri ĵusa jarkunveno de BEL (Brazila Esperanto-Ligo), kie oni ne sciis pri ILEI. BEL deziras fondi instruistan sektion, kiu aliĝu al ILEI: 50 instruistoj (nur 3-4 profesiaj, nur 5-6 ILEI-membroj). Ĉefa grupo en Sao Paulo. GEE (Francio) detale proponis al ILEI transpreni la trian eldonon de Manifesto 2000 en Esperanto kaj la franca.

Landaraj Komisionoj de UEA (Amerika, Afrika, Azia, Mezeŭropa, Balkania, EU) estu petataj apogi ILEI-projektojn, ankaŭ pri trejnaj seminarioj. Instruadoplanoj estas petataj en Brazilo. Mauro la Torre: Internacia Ekzamena Komisiono donu atestilojn. Ilin oficialigu la ŝtata universitato de Szombathelyi (Smidéliusz), se ne en Nederlando, eble en brazila universitato. Almenaŭ la instrua ekzameno estu lanĉita. Sistema de kreditumoj ebligas migradon de studentoj. La projekto Euroscola (kun vizito al Eŭropa Parlamento) petas pli da subteno el ILEI. Jennifer Bishop apogas Radojica Petrović pri tio.

#### § 6 EKSTERAJ RILATOJ

Eksteraj rilatoj: Mauro la Torre multe korespondis pri Unesko. Ĉesis Francois Lo Jacomo. En Parizo nin reprezentas Claude Nourmont (Renée Triolle?), en Ĝenevo Mireille Grosjean. Por Parizo aldoniĝas J P Bourlet (kaj GEE-reprezentantino). UEA pretas subteni FIPLV (fremdlingvaj instruistoj), kiu donas bonajn perspektivojn: Jennifer Bishop estos gvidanto.

Kun Esperanto Instituto ILEI kompilas liston de lingvistoj. El la dek italaj invititoj du respondis ke ili interesiĝas. Projekto de Mireille Grosjean "lernejoj por la paco", PACEN, Uneskoagado, kontaktis argentinan grupon. Atilio Orellana Rojas rekomendas kontaktojn kun la ĝeneralaj landaj instru-organizoj. Mauro la Torre serĉas komisioton por kontaktoj kun Freinet-movado (ICEM, Esperanto-periodaĵo).

#### § 7.3 FINANCA KONTROLKOMISIONO

Financa kontrolkomisiono: s-roj Bo Sandelin kaj Bertil Andréasson kun Lars Forsman, anstataŭanto. Akceptite.

#### § 7.4 HONORAJ MEMBROJ

Honorigo: Stefan MacGill pledas nomi novan gimnazion "Somera staĝoBarcsay Zsuzsa". Akceptite. La nomoj de Honoraj membroj aperu unufoje jare en IPR.

## § 8 ESTONTAJ KONFERENCOJ/KOMITATAJ KUNSIDOJ

### § 8.1 EN BRAZILO 2002

Sondo pri partoprenemo en Cumbuco (apud Fortaleza) aŭ Brazilo: ok ĉeestantoj emas aliĝi, supozas ke pliaj ok aliĝos. Necesas ke partoprenu iuj el la invitantoj, ne kiel ĉi tie: ebla gazetara konferenco. Atilio Orellana Rojas pledas por aprila Konferenco aŭ alisezona, por ke partoprenu junuloj. Eblas kiam UK okazos ekstereŭrope, do eble 2004, se Ĉinio gastigos UK-n. Vespere oni aldonas: nia konferenco kun alloga temo okazu antaŭ aŭ post Internacia Junulara Konferenco: Estraresploro.

### § 8.2 EN SVEDIO 2003

Agneta Emanuelsson kaj Boo Mee Kim-Lindblom informas pri du eblaj lokoj en Svedio por la Konferenco en 2003, Karlskoga popolaltlernejo kaj Esperanto-Gården.

### § 8.3 RESOLUCIO 2001

La rezolucio (Maritza Gutierrez, aldono Rob Moerbeek) estas reformulita: la aldono pri profesiigo fariĝas postnoto por interna uzo. Ĝi estos aldonita al la protokolo.

## § 9 STRATEGIA PLANO DE UEA

Stefan MacGill faris multajn rekomendojn por edukado kaj aljuĝo de rimedoj por la laborplano de UEA. Oni akceptis, sed pro IJK Stefan MacGill ne estis informita. Atilio Orellana Rojas pledas tamen ankaŭ mem trovi financfontojn ĉe EU por specifaj pacprojektoj. Mauro la Torre: mankis homfortoj por atingi ion, kun UEA, pri la Eŭropa jaro de lingvoj. Financvarba komisiono, subtena al nia kasisto, estis decidita jam en 1999.

**Vendredo** daŭrigo 31 julio. Stefan MacGill prezidas

## §10 ELDONAJXOJ DE ILEI INKLUZIVE DE IPR kaj Juna Amiko

Eldonoj de ILEI. Prezidante, Stefan MacGill transdonas al si la parolvicon: De Juna Amiko aperu numeroj 3 kaj 4. La centa numero estos la unua de 2002.

La libroplano ampleksas reverkon, eldonon de Tendaraj Tagoj volumo 1; kajeron 2 de Okuloj kun gvidilo (rete, fotokopie), Gvidilon ĉe Tendaraj Tagoj 2a (rete, same fotokopie), nepre la ELNA-mendon Ekzercoj ĉe (fotataj) lecionoj 13-16 de "Esperanto, Pasporto al la Tuta mondo", sed laŭ aŭtora preferenco. Komputilkurso, eble eldoni Mazi-materialon, atendantan de antaŭ 4-5 jaroj.

## § 11 PROJEKTOJ DE ILEI

Projektoj: Manifesto 2000 (FR) al mezlerneja publiko kun aro da afiŝoj por franclingvaj landoj (Afriko) kaj alilande en traduko (el Esperanto): Titolo "Ni kulturu la pacon/ paco inter ni, en niaj manoj". La temo de la sekva konferenco kongruas. Novaj landoj transprenu "Euroscola". Oni voĉdonas daŭrigi la projekton Interkulturo, ĉar du jaroj ne sufiĉas, kaj ĝi ĉiam valoras. Ni verku novan broŝuron kun raporto kaj nova programo. Ankaŭ por Unesko. Eblas adapti ĝin al eksterlernejaj grupoj kaj izolaj studentoj.

## § 12 CETERAJ DISKUTEND/INDAĴOJ

Ceteraĵoj: Regulara Komisiono (Hans ten Hagen kaj Rob Moerbeek) okupiĝos pri adapto de la Regularo al ĉesigo de la rotacio de estraranaj periodoj.

Bill Maxey klarigas la nunan sistemon de Internaciaj Ekzamenoj, Elementa kaj Meza. En la nova instrua ekzameno, laŭ teksto eldonita, longjara projekto de Stefan MacGill, centras Gvidanto, tutoroj helpas la kandidatojn. En kvar jaroj ili plenumu la ses postulojn. En Ekzamenkomisiono estu minimume tri personoj.

Bill Maxey montras ke la kulturaj konoj rolas nur tre modeste en la poentado. Verŝajne estu aparta ekzameno pri kulturo. Bonvenas naciaj ekzamenprogramoj en traduko.

La regularo de la Ekzameno pri Instruakapablo estas akceptata kun unu sindeteno.

Aliĝpeto de dua sekcio en Kroatio. Stefan MacGill pledas akcepti ambaŭ sekciojn en Kroatio. La dua ampleksas 45 instruistojn el kiuj kvin membras en ILEI: Ĝi estas la instrua fako de Kroata Esperanto-Ligo. Unuanime akceptite. Do presigi en IPR: Kroatio:KEU kaj KEL, Kroata Esperanto-Ligo.

**Vendrede** la 3an de aŭgusto 2001 je le 16a horo

Prezidas Jennifer Bishop, ĉar foriris la prezidanto Mauro la Torre kaj la vicprezidanto Stefan MacGill. Ĉeestas fine 16 komitatanoj.

#### § 7.1 ELEKTOKOMISIONO

Parolo pri komisionoj: Elekta: Gwenda Sutton, kunvokanto, Joseph Catil kaj Maritza Gutierrez elektitaj en 2000 por tri jaroj.

La ero 2.6, prokrastita, "Nomumo de elektokontrolantoj". Ni ne bezonas trakti ĉi tiun eron, ĉar ĉiuj estis unuanime elektitaj.

.

#### § 12 CETERAJ DISKUTINDAĴOJ (daŭriga)

Diskuto pri novaj ideoj el ĉi tiu konferenco:

Junigo de la partoprenantaro per okazigo tempe/loke/teme proksime al Internacia Junulara Konferenco kaj atento al trejnaj seminarioj.

La temo de 2002: "Por lingva ekologio". Krome estu metodologia trejnado.

Luigia Oberrauch Madella proponas donaci informlibron al la senscia biblioteko de Lovran.

Pri Lerneja komisiono, elektita en 1998. Radojica Petrović finas, ĉar tiu problemo pri la lerneja komisiono ne estis enprogramigita, kaj ĝi ne nepre limiĝu al tri jaroj: traktu posta komitatkunsido.

#### § 13 FINO

Jennifer Bishop finas la kunvenon kaj dankas al la partoprenantoj.

Protokolis: Agneta Emanuelsson

Revivigis, supersignigis: SMG Feb 2011